

la bestoposedanto, por efike apliki helpon laŭ la homeopatia latinlingva gvidmotivo *similia similibus curentur*, nome ke “similo kura-cu similon”.

#### Adreso de la aŭtoro

Monika SCHMALSTIEG  
Hannoversche Strasse 156  
DE – 31582 Nienburg / GERMANIO


<THP.Schmalstieg@web.de>

#### Priaŭtoro informo

La aŭtorino estas naturkuracistino por bestoj (kun la specialaj fakoj: homeopatio por utilig- kaj hejmbestoj, fizioterapiistaj aplikoj, energetika masaĝo por ĉevaloj, lasera akupunkturo) kaj docentino ĉe la Germana Paracelso-Lernejoj. Ŝi ankaŭ estas fondomembro (kaj nuna estrarino ĉe la prezidantaro) de “Asocio de Germanaj Best-Homeopatoj (ADF)”.

#### Redaktora postrimarko

Menciindas kadre de alternativaj naturkuracadoj ankaŭ la elektra magnetresonanc-stimula terapio (eMRS), kiu estas aplikata same influe ĉe bestoj kiel ĉe homoj. Fakte la reciproka efiko de elektra pulsa aŭ stata kurento kaj variado de magneta alternado estas pli ofte aplikata en veterinara ol en homkuraca medicino. Temas pri aplikiloj (bastonoj, kusenoj, matoj, tapiŝoj), malgrandaj por hundoj kaj katoj, kiuj ŝajne “sentas” la bonan efikon de eMRS kaj ofte libervole kuŝiĝas sur la aplikilo. La terapio estas aplikata i.a. kontraŭ artikaj afekcioj de la moviĝ-aparato, artrozo, hemostazo kaj malakcela vund-resaniĝo, muskolaj doloroj kaj malsanoj efikantaj al la aŭtonoma nervosistemo. Ĉe remaĉuloj aplikigaĝas altaj kuracŝtupoj, tre efikaj ankaŭ sur



la laktado de bovinoj. Precipe ĉevaloj estas rigardataj plej sensivaj por eMRS: ekzistas raportoj pri bona efiko kontraŭ nervozeco de rajd-, turnir- kaj kurĉevaloj kun samtempa altigo de ties laborpovoj. Grandaj ĉevalmatoj ebligas tutkorpan terapion (vd. bildon) per pulsa elektromagneta kampo, kaj specialaj gamaŝoj estas uzataj por la kuracado de artikoj, tendenoj kaj ligamentoj. (sa)

### Scienca ĉio veterinara


#### Oni jam vidis ĉevalojn vomaĉi...

De kie venas tiu stranga dirmaniero, kvazaŭ proverba parolturno? Nu, ĝi esprimas la ekston de preskaŭ nebla okazontaĵo aŭ, alivorte, ĝi substrekas la alvenon de tute neverŝajna evento. Ĉevaloj preskaŭ ne kapablas “regurgiti” (veterinara faktermino por “vomi”). Tio dependas, interalie, de la fakto, ke ĉevaloj disponas pri tre forta sfinktero fine de la ezofago elire en la stomakon. Pro tio, la vojo de nutraĵo el la stomako reen en la ezofagon estas jam antatomie tre komplika afero. Sekvas el tio, aliflanke, ke ĉevaloj forte inkliniĝas al kolikoj pro manko de senproblema regurgiteblo. Tamen, facile aŭ malfacile – oni jam vidis ĉevalojn vomaĉi. (2005-10-13)



#### Hundaj kaj homaj vivojaroj

Ĉu 1 homa vivojaro egalas al 7 hundaj vivojaroj? Ne tute. Ekzistas pluraj akcepteblaj formuloj de prikalkulado kaj taksado. Jen la plej realisma: la unua vivojaro de hundo egalas al 21 homaj vivojaroj. Ĉiu plua hundojaro egalas al 4 homjaroj. Do, se vi estas posedanto de 7-jaraĝa hundo, vi povas elkakuli  $21 + (6 \times 4) = 45$  jarojn laŭhomvive. Ĝi do estas en sia “plej bona aĝo”. La kalkulo komparas 10-jara hundo al 57-jara homo, kaj 15-jaraĝa hundo al 77-jarulo. Tio certe estas pli proksime al la fakto ol kalkulo laŭ la “1=7”-metodo, kiu rezultigis 105 jarojn kompare al 77. Cetere, al via hundo tiu ĉi aŭ iu ajn alia vivjarkomparkalkulo estas tute seninteresa ... (2005-04-07)



#### Kuraĝa subakviĝisto

Kiu estas la subakviĝ-rekordulo inter la mamuloj? Nek la kaĉaloto *Physeter catodon* (subordo *Mystacoceti*, familio de *Physeteridae*), nek la marelefanto *Mirounga leonina* (el la rostro-fokoj, familio de fokedoj *Phocidae*, subfamilio *Cystopturiinae*), sed la profundmara rekordulo estas la “nordmara anser-cetaco” *Hyperoodon ampullatus* (el la cetaca subordo de dentocetacoj *Odontoceti*, familio *Ziphiidae*), kiu mezuras ĝis 10 metrojn longa kaj pezas 7 tunojn. Kaj ĝi estas ĝis nun nur malmulte esplorita, ĉar ĝi

